

Heroldo de Esperanto

Neŭtrala organo de la Esperanto-movado. — Aperas dufoje en la semajno (merkrede kaj sabate)

Profektantaro:
 D-o Leono Zamenhof, Warszava
 W.M. Page, advokato, Edinburg
 Ernest Archdeacon, Paris
 Juan Gilli Noris, komercisto, Barcelona
 H. Fischer-Galac, grandindustriisto, Bucaresti
 Frans Schoofs, Antwerpen
 Paŭlo v. Medem, bank-kaj Fabrik-direktoro, Kaunas ĉ.

Administracio:
 Horrem bei Köln, Germanlando.

Redakcio:
 Cefredaktoro: Teo Jung
 Redakciaj kunlaborantoj: Jung kaj M. Buijn, L.K.

Prezo de Abono:
 ĉe duonsemajna ekspedado: po numero egalvaloro de 0.20 sv. fk., mendita per loka poŝtoŭficejo 0.15 sv. fk.;
 ĉe semajna ekspedado (du numeroj kune): po numero 0.15 sv. fk.

Prezo de Reklamo:
 po unucentimetra kolonoro egalvaloro de 2.- sv. fk. (antaŭpage 1.50 sv. fk.), minimuma alteco 5 cm.
 Anoncoj po dufoja enpresado kaj po 10 vortoj egalvaloro de 0.60 sv. fk.

Agentejoj en Antwerpen, Barcelona, Bucaresti, Budapeŝto, Będgoszcz, Haag, Helsinki, Hradec Králové, Kaunas, Liverpool Lyon, Moskva, Oslo, Riga, Rio de Janeiro, St. Gallen, Sofia, Stockholm, Tallinn, Tokio, Verona, Warszawa, Zagreb.

Viktimo de scienco: Prof. Bergonié, Bordeaux amiko de Esperanto.

Fiziologia leĝo de Bergonié kaj Tribondeau estas fidel resumebla: „Kanceraj ĉeloj estas detruataj de la X-radioj, sed sanaj ĉeloj ne estas malbone influataj de ili.“ Tiu leĝo estas vera, nur kondiĉe ke sanaj ĉeloj ne estu tro ofte kaj ne restu tro longe malŝirmataj kontraŭ tiuj X-radioj. Oni nun konas plurajn sciencistojn, kiuj estas krippligitaj aŭ mortigitaj de tiuj X-radioj. Jusa ekzemplo:

En 1912, pro radiodermito, oni devis amputi la duan fingron de lia dekstra mano...

Fine de 1921, oni devis amputi la kvinan fingron...

Sekvis nevrto de l'dekstra brako kun doloro, kiujn li stoke toleris. Meze de 1922, oni devis amputi lian tutan dekstran brakon...

Tamen la malsano progresis, kaj 67-jara li mortis la 2 januaro 1925...

... Tio estas la historio de Prof. Bergonié, ĝuste la ĉefa aŭtoro de la supre citita leĝo!

Licencio pri fizikaj kaj pri naturaj sciencoj, medicina doktoro (tezo pri muskola elasto), J. Bergonié estis post Tripiet la patro de medicina elektro en Francando: al li oni ŝuldas la elektran kuracadon de paralizo kaj de muskolaj atrofioj, la fizioterapian kuracadon de trograseco k.a. Li studis la modifojn de la arteria tensio per la altfrekvencaj elektrofluo, konigis diatermalon, kreis la dupolusan elektrolizon k.t.p.

Tuj kiam li konis la laborojn de Roentgen en 1895, li dediĉis sian serĉadon al la X-radioj; tuj post la eltrovo de Curie li studis la efikon de radiumo. Dum la milito li elpensis la elektro-vibrilon por lokalizi la pafajojn profunde en histoj. Li fondis en 1895 kaj direktis la revuon „Arhivoj pri medicina elektro“.

Dum tiuj lastaj jaroj li senĉese kaj senlace klopodis por organizi efikan batalon kontraŭ la kancero, kaj li kreis en 1923 la unuan regionan centron tiucelan. Tiam, ĉe la inaŭguro, oni povis prave diri: „Majstro pri scienco, pri kuraĝo, pri homamo, Bergonié oferis parton de si mem.“

Bergonié estis profesoro pri biologia fiziko kaj profesoro pri medicina-elektra kliniko ĉe la Fakultato de Bordeaux, nacia korespondanto de l'Medicina Akademio, korespondanto de l'Scienca Akademio; li ricevis la grandan medalon Edwards Longstreth de Franklin-Instituto (Usono) kaj dufoje oran medalon de Carnegie-Fondaĵo. La 14 decembro 1924 li fariĝis grand-kruco de la Honora Legio; tiam oni devis lin porti al la amfiteatro, kie li kutime instruis. Li la scias, ke li baldaŭ mortos, sed dum tiuj lastaj semajnoj, ĝis sia antaŭlasta tago, li ĉiam havis zorgojn pri sia kreaĵo: la malsanulejo por kanceruloj.

Per sia testamento, Prof. Bergonié petis, ke okazu neniu funebra ceremonio, postlasis sian libron al la Medicina Fakultato de Bordeaux, sian aparataron kaj 100000 fr. fk. al la malsanulejo. Fine li esprimis deziron, ke lia korpo utilu por studi la efikon de la X-radioj kaj ke la nekropsio estu farata ĉe lia Fakultato.

Prof. Bergonié estis prezidanto de la Grupo Esperantista de Bordeaux de 1904 ĝis 1911 kaj poste ĝia honora prezidanto. En 1908 li skribis al s-o D-o Pierre Corret tiun frazon, kiun li re-prenis en sia medicina tezo: „La utilo de la alpreno de internacia helpingo por medicino ne povas, miaopinie, esti diskutata.“ L. P. en L.

Tra la mondo.

— Laŭ deklaro de generalo Primo de Rivera ne ekzistas politika aŭ ekonomia kaŭzo por ĉesigi la konstruadon de la fervojo Tanger-Fes.

— La unua „nubogratalo“ de New-York, konstruita antaŭ 40 jaroj kaj havanta altecon de dek etaĝoj, estas malkonstruota kaj anstataŭota per nova konstruaĵo, kiu havos altecon de 34 etaĝoj kaj kostos ĉ 10 milionojn da dolaroj.

— Laŭ telegramoj el Lisboa, la 4000 kvm granda insulo Port Alexander, situanta ĉe la bordo de Okcidenta Afriko kaj apartenanta al Portugalujo, subite malaperis. Pri la sorto de la loĝantoj (portugaloj) oni scias nenion.

Scienco.

5-a Internacia Kongreso pri Historio de Medicino

okazos la 20-25. 7. 1925 en Genève, prezidate de la Medicina Societo de Genève.



Prof. J. Bergonié ĉ.

Arkeologio.

La urbo de la sibaridoj.

Antaŭ 2500 jaroj la urbo Sibaro (Sybaris) malaperis de la tero, sed la sibaridoj — laŭ la nomo — estas ankoraŭ hodiaŭ disipitaj tra la tuta mondo kaj honorigas la nomon de urbo, kiu fariĝis nemortebla pro sia volupteco, sia dolĉa inerteco, sia ĉiam solena vizaĝo kaj sia ĝuema oportuneco. Nun la urbo estas renaskiĝonta el sia cindro. Antaŭ nelonge fondita arkeologia societo de Reggio (elp. Reĝo) en Kalabrio metis al si la taskon elŝiri la ruinojn de Sibaro el la tero; oni esperas, ke tiuj ĉi laboroj havos same bonan sukceson, kiel siatempe ĉe Pompej. Oni fidas, ke oni trovos la loĝejoj de la sibaridoj kaj ekscios detalojn pri la vivarto de tiuj famaj homoj. La laborojn gvidas Prof. Galli, kiu depost multaj jaroj estas direktoro de la arkeologia muzeo en Firenze, kaj kiu ankaŭ instigis la elterigadojn ĉe Fiesole, per kiuj oni trovis faman etruskan templon.

M.W.

Astronomio.

La suneklipso de 24 januaro

estas precipe en Usono observita kun plej granda atento kaj intereso. Ĝi ja estis la unua tuta sun-eklipso, kiun ĝis nun vidis iu blankulo en tiu parto de la mondo. Oni salutis la fenomenon

kun entuziasmo, kvazaŭ ĝi estus popola festo. La tuta populacio partoprenis. Ankaŭ la aerŝipo Los Angeles (sistemo Zeppelin) observis en alt-eco de 3000 futoj la eklipson kaj donis sendrat-ajn raportojn pri siaj observoj. La astronomoj estas tre kontentaj kaj esperas, ke la observoj rezultigos bonajn sukcesojn. Oni konstatis la grandan malhelpan influon de la sunradioj sur la radioondojn. Dume alitempe oni ne povas dum-tage aŭdi en Ameriko iun ajn eŭropan stacion, oni aŭdis dum la eklipso la unuan fojon dumtage en Philadelphia la stacion London.

Egiptologio.

Post la esplorado de la tombo de Tutankhamen la publiko ekinteresiĝis pri tiu ĉi scienco. Tial ni decidis konigi kelkajn interesajn faktojn de tiu ĉi kampo.

Nomo. La nomo „Egiptujo“ estas greka. La antikvaj egiptoj nomis sian landon „Kem“ (nigra lando). Tiamaniere ili diferencigis la fekundan valon de l'rivero Nilo de la ruĝ-sabla dezertego de Arabujo.

Deveno. Opinioj pri tiu ĉi problemo tre diferencas. Kelkiuj asertas, ke la antikvaj egiptoj estis de afrika deveno, aliaj diras, ke ili devenis el Azio. Laŭ antropologia esploro, ŝajnas, ke lastuloj pravas. Pri tempo de tiu ĉi popolmigrado oni ne havas certecon. La egiptoj sin okupis pri agrikulturo, besibredado kaj ŝipveturado.

Konstitucio. Reganto estis la faraono, laŭ mitologio li estis ido de Dio Ra (Suno). Liaj signoj estis: la krono, serpento, sceptro, skurĝo, glavo. La faraono estis suvereno, absoluta monarko. La oficistoj de la ŝtato estis instruitaj personoj. Ilia salajro konsistis el naturajoj (greno, pano, biero, anseroj ktp.) La leĝdonado estis bona kaj laŭvorta.

Familia vivo. Ili estis kutime monogamuloj (unu edzino). La viro ofte edzinigis sian fratinojn (ankoraŭ ĉe la romanoj). Ili tre amis la infanojn. La ĉefo de la familio estis la patrino. Infanoj estis modele instruitaj.

Religio. Eĉ se ĝi strange sonas: ilia religio estis originale monotheista (unu Dio). Jen mi citas: „Dio estas unu, la unika, apud kiu neniu estas. Li kreis ĉion, Lin neniu kreis.“ Nur oni personigis lin ĉi Dion malsimile. Praktike ĉiu urbo estimis ĝian alian formon. El tiu ĉi konglomerato de dioj formiĝis la egipta mitologio. „Ra“ estis la ĉefdio, la dio de la suno; la suno mem. Ili adoris eĉ bestojn, kiel elefanton, ŝafon, bovinon, ŝakalon, katinon, leonon, anseron ktp. Por preĝi al la dioj, ili konstruis preĝejojn. Al la ĉefidolo ili oferis diversajn. Plej granda estis la „Amon“-preĝejo en Theba.

Estimo al la mortintoj. Laŭ ilia opinio la homo havas du animojn, el kiuj unu forlasas la korpon ĉe la morto, flugas al Dio Oziris kaj post juĝo restas en la paradizo. La alia animo restas ĉiam en la proksimo de la kadavro. La tombon ili nomis „eterna loĝejo“, per balzamizo ili mumiigis la mortintojn. La tombo mem aspektis fakte kvazaŭ loĝejo. Eĉ meblo ne mankis, kaj oni alportadis manĝaĵojn de tempo al tempo. Oni skribis sur la murojn de la tombo la tagajn okazaĵojn.

Balzamizo. Pulmon, koron, hepaton oni fermis en alabastrajn ujojn. La korpon oni senigis de internajoj, lavis per palmovino. La procedo de la balzamizo ne estas precize konata. La kadavron oni kovris per ŝtofa vestaĵo pro protekta kaŭzo.

Piramidoj. La grandaj faraonoj, kiel sciante, estis entombigitaj en piramidojn, kiuj estis konstruitaj per grandega aparato.

Lingvo kaj literaturo. La egipta lingvo apartenas al la semida lingvofamilio. Ni diferencigas antikvan kaj novan egiptajn lingvojn. La antikva egipta lingvo konsistis nur el konson-

antoj. Egiptoj posedis tri skribsistemojn: la hieroglifan, la hierarkian kaj la demotikan sistemojn. Longe oni cerbumadis, ĝis oni sukcesis kompreni egiptajn surskribojn. Francisko Champollion solvis ĝin unue. La egipta literaturo enhavas religiajn, poeziajn kaj beletristikajn dokumentojn. Oni trovis sciencajn (astronomiajn, kirurgiajn, matematikaĵajn kaj filozofiajn) notojn.

Kalendaro. Unue ili uzis la lunon, poste la Sirionon kiel bazon por determini la superakviĝojn de la Nilo.

Geometrio. Pro ĉiujara superakviĝo estis necese mezuradi la bienojn. Tiel per vojo de necese evoluigis geometriaj tezoj. *Jozefo Major.*

Tekniko.

La plej granda veŝipo de la mondo ĵus estas enakvigita ĉe ŝipkonstruejo Deutsche Werft en Hamburgo. La ŝipo estas konstruita por la firmao Axel Broström kaj filo en Göteborg, Svedujo. „Svealand“ (jen la nomo de la ŝipo) estas longa 167.66 m, larĝa 21.94 m kaj havas portkapablon de 20600 t.

Kulturo.

Mortpuno pro mallaboremo.

En parolado pri antikva Peruo. Senor Salomon la Londona Konsulo Ĝenerala por Peruo, atentigis, ke la ruinoj de la inka-civilizacio estas disvastigitaj super enlimajo de Panamo ĝis Ĉilio. Ankaŭ pli grava ol la inka-civilizacio estas la fakto pri antaŭ-inka-civilizacio, nomita Tia Huanko, kies restaĵoj — monumentoj, unuŝtonaj kolonoj, palacoj, fortikaĵoj ktp. — estas trovitaj en Bolivio, en Kuzko (Cuzco), ĉirkaŭ Lago Titikako (Titicaca), kaj en multaj aliaj lokoj disvastigitaj.

La inkaoj estis granda terkultura popolo, kaj la restaĵoj de iliaj kanaloj kaj akvokondukiloj oni povas vidi ĉe multaj lokoj apud la marbordoj de Peruo.

Ili havis nek riĉulojn, nek malriĉulojn. La ŝtato faris ĉion por siaj regatoj, sin intermetante en ĉion, eĉ en la aferojn de vivo privata. Estis tri klasoj, la Reĝa Familio, la pastroj kaj la popolo. La ĉefa pastro kaj la ĉefa de la militistaro estis el la Reĝa Domo. Ĉiu viro de dudekunu jaroj kaj ĉiu knabino de dekdek jaroj devis edziĝi. Al ĉiu infano oni donis pecon da tero, knabo ricevis pli ol knabino. La tutan laboron faris la popolo, kaj ĉiu homo — viro, virino, infano — havis sian propran porcion da laboro. Al neniu estis permesate tro labori, sed neniu kuraĝis esti mallaborema je mortpuno.

Tradukita el „Tit-Bits“ de *Leslie E. Thomas.*

Sporto.

Kurado.

La finna majstro Nurmi aldonas en Ameriko venkon post venko. En Chicago li kuris $1\frac{3}{4}$ mejlojn en 7.55.4 minutoj. En New-York li irakuris $2\frac{1}{2}$ mejlojn (ĉ. 3620 metrojn) en 10.42 kaj $2\frac{3}{4}$ mejlojn (ĉ. 4425 metrojn) en 13.05 minutoj.

Aviado.

25. 1. la franca flugisto Descamps starigis novan mondrekordon je 500 km kun ŝarĝo de 500 kg. Li atingis pohoran rapidecon de 216 km.

Mi demandis ŝin.

Mi demandis ŝin, ĉu daŭra
Estos ŝia amkonfes?
Ŝi silentis; sed okuloj
Ŝiaj klare diris: jes!

Mi demandis, ĉu promesas
Ŝi min ami ĝis la mort?
Ŝi silentis, sed la koro
Batis tuj laŭ tuta for! . . .

Mi demandis, ĉu pri amo
Pruvon donos ŝi al mi,
Silentante sian buŝon
Al la mia metis ŝi . . .

Verkis originale *I. Lejzerowicz.*

Dum nokta trankvilo.

De S. Živanović.

Kuprobriĝinta suno eniris la okcidentan parton de l' kurbigita ĉielo. Ni ekpromenis al malnova urbruino, kie tiel dolore flustras la folioj de centjaraj kverkoj . . .

Niajn animojn surprizis la elveno de luno, kiam ni lacaj atingis la urbruinojn. Malnovaj, per musko kovritaj muroj, inter kiuj iam loĝis tiranoj, kvazaŭ ploras pro sia jam delonge pasinta gloro, ĉar ilia aspekto estas tiel dolora. Iam sur tiu ĉi sama loko estis fieraj palaco plena de ĉiuseca lukso. Iam tie ĉi loĝis la nobelulo, kiu estris la tutan ĉirkaŭaĵon. Li estis ĉirkaŭita de sennombraj sklavinoj . . .

La luno ridas sur ĉiela altaĵo. Ĝi estas nia malnova akompananto dum niaj promenadoj tra mildaj printempaj noktoj. Ĝi ofte sciis pleniĝi niajn animojn per grandiozaj sentoj. Ĝi estis la atestanto de anima konfeso kaj de la unua pasia kiso. Tiam ebrie odoris montaj floroj! Tiu kiso estis festo majesta . . . jes, ĝi estis kaj pasis kiel radio de feliĉo, kies memoro ankoraŭ estas en ni. Ĝi estis kaj pasis kiel la gloro en la mondo. Per ĝi konfirmata amo nur restis . . .

Diversaĵo.

Apostolo de interpunktado.

Oni tiel kutimas je iaj fonditaj karakterizaĵoj de la presita libro, kiel interpunktado, titoloj k. c., ke ŝajnas iom malfacile imagi libron sen ĉi tiaj helpoj Tamen, kvankam la presado per movebla tipo estis elpensita jam en 1487, la tipografistoj alprenis nur post kelkaj jaroj tian memevidente bezonan helpon kia estas interpunktado.

La „Lactantius“ presita de Sweeneyham kaj Pannariz en Subiaco apud Romo, estis la unua libro, kiu presigis en Italujo, kaj ĝi havis la unuajn punktojn aliajn ol oblikva linio kaj punkto. Ĝi havis punkton, dupunkton kaj demandsignon.

La unuaj presistoj imitis ne sole la manskribon — kune kun mallongigaj kaj kunigitaj literoj k. c. — sed ankaŭ la nebenajn liniojn. Kiel rezulto, frue-presita libro ŝajnas ofte kiel libro skribita en laŭforma skribado. La tipon de Caxton oni diras esti provo reprodukti lian propran manskribon per tipo.

En la deksesara jarcento la presarto estis preskaŭ fondiĝinta kiel arto, aparta de manuskripta skribado. La presita libro ĉesis reprodukti la proprajn karakterizaĵojn de la skribita libro, kaj ekprenis sian formatan karakterizan. La bezono de normigita sistemo de interpunktado urĝigis. Por kontentigi la bezonon Aldus Manufius enkondukis sistemon de punktoj bazitaj sur la punktoj de la grekaj gramatikistoj, per kiuj li disrompis la senintermankajn liniojn en vortojn, kaj apartigis la vortojn en frazojn. Ĉi tuj Aldina sistemo, precipe ŝuldada al la elpenso de la presarto en la dekkvina jarcento, formas kun iaj plibonigoj de postaj tipografistoj nian modernan planon de interpunktado.

Trad. L. E. Thomas el „John O'London's Weekly“.

La rekordo de maldormado.

En koncertsalono de Livorno (Italujo) oni aranĝis antaŭ nelonge konkurson de maldormado. Kelkdek personoj de ambaŭ seksoj en daŭro de du pentagaj penis venki la dormon, sed fine la virino devis forlasi la konkurso-salonojn. 80 homoj da maldormado, kiuj estas aljuĝitaj kiel rekordo, eltenis du viroj, al kiuj oni aprobis premiojn en la sumo de 3500 liroj.

Trad. J. Receptor, Luck.

Radio.

Parolado en Esperanto ĉe nederlanda stacio Hilversum.

Vendredon 25. 1. je 9.25 h. vesp., s-o Dreves Uiterdijk, parolis dum 10 minutoj en Esperanto ĉe stacio Hilversum (1060 m). Ni lin aŭdis, parolantan pri solena momento, en kiu li per radio povas paroli en Esperanto; pri heredaĵo el la tempo, kiu estas la spektaklo de l' diverslingveco (eĉ profesoroj, kiuj multe eltrovas, ne ĉiam povas interkompreniĝi); pri lenado dum tuta vivo por lerni lingvojn, kvankam kelkaj monatoj sufiĉus, ktp. Poste li deklamis la „Esperon“. Fine li kore salutis kaj promesis baldaŭnan reaŭdon.

Estus tre utile, se ĉiuj aŭdintoj, precipe germanoj kaj aliaj eksterlandanoj, petus la stacion Hilversum pri pluj disaŭdiĝoj en aŭ pri Esperanto.

A. H. J. en N.

Favoraj radio-revuoj.

Der Deutsche Rundfunk, Berlin, enhavas ankaŭ en siaj numeroj de 11., 18. kaj 25. 1. daŭrigojn de esp. kurso.

Süddeutscher Rundfunk, München, 18. 1., enhavas Radio-Esperanto-Kalendaron (laŭ „Heroldo“) kaj daŭrigojn de esp. kurso de Hans Koch.

Cetere ĉiuj radio-revuoj, kiuj enhavas la programojn de germanaj stacioj, kompreneble ankaŭ mencias la esp. prezentaĵojn.

En unu semajno oni vendis pli ol 400 esp. lernolibrojn por radio-kurso.

En Münster i. W. (Germanujo) oni sola libroj disvendis en unu semajno pli ol 400 esp. lernolibrojn por la aŭdantoj de la lecionoj de f-lino Adrian. Oni sendu al ŝi esp. librojn, presajojn ktp., por ke ŝi povu ilin rekomendi per radio. Adreso: F-lino stud. fil. G. Adrian, Münster i. W., Krummer Timpen 51.

Esp. Radio-Kalendaro.

Jen la listo de radio-stacioj, kiuj regule disaŭdigas esp. kursojn, paroladojn, kantojn ktp.

Dimanĉe. Tgm. 12.00—12.10 h. Königs-wusterhausen, ondo 2800: Esp. programo.

Lunde. Ptm. 4.45 h. Hamburg, ondo 395. Dek minutoj da Esperanto. (S-o Minor.)

Vesp. 7.15—7.45 h. Breslau, ondo 418: Komerca esp. instruo. (F-lino Polier.)

Merkrede. Vesp. 7.30—8.00 h. Königsberg, ondo 465: Esp. kurso. (S-o Schattat.)

Vesp. 9.30 ĝis 10.00 h. Kō b n h a v n, Radiofoni Station, ondo 775: Esp. aranĝo. (S-o Lendorff.)

Vesp. 10.00—10.45 h. Münster, ondo 410: Esp. kurso. (F-lino Adrian.)

Ĵaŭde. Vesp. 7.15 h. München, ondo 485: Esp. kurso. (S-o Koch.)

Vendrede. Vesp. 7.30 h. Frankfurt, ondo 470: Esp. kurso. (Instr. Urban.)

Sabate. Ptm. 4 h. Berlin, ondo 505: Esp. kurso. (Dir. Glück.)

Vesp. 7.30—8.00 h. Königsberg, ondo 465: Esp. kurso. (S-o Schattat.)

La tempoj donitaj signifas MET (Mez-Eŭropa Tempo).

Se ekzistas aliaj stacioj, kiuj regule disaŭdigas esp. kurson, paroladon, kantojn ktp., ni tre petas, tion sciigi al nia redakcio.

Antaŭsciigo. Vendredo, 6. 2. vespere 6.40 h (OkcET) Aberdeen, ondo 495: Parolado pri Esperanto. (S-o Jarvis.)

Averto. Okazas kelkfoje, ke la stacioj ŝanĝas la sciigitan tempon. Se do oni foje ne aŭdas la deziritan stacion, oni ne tuj formetu la aŭdilon, sed atendu eble duonan horon!

Sukcespromesa radio-entrepreno serĉas esperantistojn kiel partoprenantojn.

Nove-fondota, ĝis nun senkonkurenca entrepreno de radio serĉas esperantistojn kiel partoprenantojn. La entrepreno promesas ankaŭ gravan helpon al la esp. movado. Interesatoj legu la anoncon en la hodiaŭa numero!

Ni interparolis pri la mondo, kaj la steloj tremetis. La steloj! Kiel estus feliĉa tiu tirano, se li ilin amis! Li certe ĵetus sian glavon sur ŝtonon, por ke ĝi dispecigu je malgrandaj pecetoj. Sed li ne konis la simbolon de la steloj . . .

Antaŭ ol ni foriris, vi ion ekdeziris. Vi ekdeziris ion strangan, jes, ĉarma belulino: vi volis iri tra la mondo kaj disdonaci la kisojn de via rozkolora buŝo, por ke tiuj kisoj estu simboloj de frata amo inter ĉiuj homoj. Vi ekdeziris, kiel malgranda infano, depreni tiun plej belan stelon por ĝin enmeti en ĉiujn korojn! Strange, sed tamen vi tion diris. Tiel naive! Kaj sur la vojo vi certe esperis la plenumiĝon de viaj deziroj, ĉar vi flustris versojn el la glora preĝo!

Kaj malantaŭ ni restis la ruino kiel atestanto de iama gloro. Neniu plu funebrias la tiranon, ne ploras pro lia sorto. Ĉar lia gloro pasis kiel ĉiu gloro akirita per la glavo. Jes, tia gloro pasas kiel fajro sur akvo, dum la amo por estonta feliĉo de l' homaro estas pli forta ol la morto kaj eterna kiel diaĵo.

Hospitaloj.

De Vianna de Carvalho.

Kaŭzis kompaton la rigardado al tiuj rangoj da litoj simetrie aranĝitaj en la salonoj de l' mal-sanuloj. En preskaŭ ĉiuj litoj estas maldikaj estajoj, organismoj konsumitaj de l' fitzo, malgras-egaj vizaĝoj atendantaj la lastan kison de l' morto.

La malfavoro de l' sorto estis ĵetinta tien la viktimojn de l' mizero kaj la pereintojn en la vivado.

Ili venis el stratetoj senlumaj, el ruiniĝintaj domaĉoj, el polvoplenaj fabrikejoj, persekuitaj de

17-a Universala Kongreso en Genève

2.-7. 8. 1925.

Loka Kongresa Komitato. — La estraro de la Loka Kongresa Komitato (L. O. K.) konsistas el unu reprezentanto de la Internacia Centra Komitato (C. K.), D-o Privat, unu de la komitato de UEA, s-o Paul Bouvier, unu de Svisa Esperanta Societo, f-lino Alice Diekmann, unu de la Geneva grupo "Stelo", s-o Rinaldo Borsa. Financa fakto: s-o Hans Jakob. Ĝenerala sekretario: s-o Robert Kreuz.

Vizo de pasportoj. — El jenaj landoj la kongresanoj rajtas eniri Svislandon *sen vizo*, nur prezentante sian nacian pasporton: *Franujo, Liechtenstein, Belgujo, Danujo, Brita Imperio, Luksemburgo, Nederlando, Norvegujo, Svedujo, Hispanujo, ĉiuj ŝtatoj de Ameriko, Ĥinujo, Japanujo.*

Ailandaj kongresanoj devas prezenti sian pasporton al la svisa konsulejo, kie ili ricevos senpagan vizon montrante sian kongreskarton. Kie ekzistas specialaj kondiĉoj pri vojaĝo eksterlanden, la L. K. K. faros necesajn klopodojn ĉe la konkerna registaro.

La Somera Universitato.

La ĉefa novaĵo por la esperantistaro en 1925 estos la Somera Universitato en nia lingvo. Jam antaŭ la milito D-o Privat projektis tiun aferon kaj de la 1 ĝis 7 aŭgusto 1925 li intencas ĝin realigi unufoje laŭ la jena programo, se sufiĉa nombro da partoprenantoj enskribiĝos:

Vendredon, 31 julio, vespere, la somer-kursoj en Esperanto solene malfermiĝos per ceremonio ĉe la Geneva Universitato sub prezido de ties Rektoro.

Sabaton, 1 aŭgusto, la prelejoj komencos kaj okazos regule ĉiumatene. La somer-universitato enhavos kredeble kvar sekciojn, unu pri pedagogio kaj psikologio, unu pri lingvo-scienca, unu pri fizika scienco kaj unu pri internacia juro.

La unua sekcio estos aranĝata rekte de la universitata lernejo de pedagogiaj sciencoj (Instituto J. J. Rousseau) sub persona gvidado de la konata Prof. Pierre Bovet. Krom la prelejoj pri psikanalizo kaj novaj pedagogiaj metodoj, la sekcianoj kunvenos en la instituto kun Profesoroj Bovet, Baudoin, Flügel, de la Londona Universitato k. a. por interparoli pri tiuj temoj kaj kune vizitos interesajn lernejojn, eksperimentaĵojn, ktp. Tiu fakto interesas antaŭ ĉio la ĝeinstruistojn kaj edukistojn.

La dua sekcio estos aranĝata de la Internacia Instituto de Esperanto. Prof. Collinson, de la Liverpoola Universitato, kaj aliaj diverslandaj lingvistoj prelegos tie pri la historio, literaturo kaj sintakso de nia lingvo kaj pri lingvoscienco ĝenerale. Ĝi interesos ĉefe tiujn, kiuj deziras pliperfektigi sian konon de Esperanto kaj kapabliĝi por instrui ĝin.

La tria sekcio dediĉos prelejojn al scienco kaj tekniko de radio, celante aŭdiĝi en nia lingvo klaran instruadon pri tiu temo per kompetentaj scienculoj el diversaj nacioj.

La kvara sekcio estos aranĝata kun helpo de la Ligo de Nacioj, de la Internacia Labora Oficejo, de la Universala Poŝta Unio, de la Universala Telegrafa Unio kaj de la Internacia Komitato de la Ruĝa-Kruco. Ĝi celos informi precize la

studantojn pri la statutoj kaj funkciado de la oficialaj interŝtataj institucioj. Krom prelejoj okazos ankaŭ vizitoj.

Ni esperas, ke la enskriba pago por la somera universitato povos malaltiĝi ĝis 5 sv. frankoj por la kongresanoj, sed, ĉar ĉiu sekcio kompreneble povos ricevi nur limigitan nombron da partoprenantoj, ni petas afable ĉiujn aliĝintojn, ke ili jam de nun informu nin, *sur aparta papero*, al kiu sekcio ili deziras aliĝi, ĉiam indikante sian profesion kaj laŭvole sian universitatan aŭ lernejan gradon, se ili posedas tian.

Vidu ankaŭ ET 222 de 6. 12. 1924!

La Deko Katolika Esp. Kongreso

okazos la 15—16 aŭgusto en Paris. Oni diskutos pri la temo: La katolika gazetaro en la mondo.

La Loka Organiza Komitato konsistas el: prez. pastro Duvaux, vicprez. pastro Ramboux, ĉefsekr. Prof. Muffang, kas. f-lino Larroche, helpsekr. f-lino Dalaut kaj s-o R. Colas, membroj s-oj Delanoue, Herlemont kaj de Lajarte. Kongreskolizo 25 francaj frankoj.

Provizora programo.

Ĵaŭdo, 13. 8. — Je 16 h., solena malfermo de la Kongreso.

Vendredo, 14. 8. — 8 h. Pilgrimo al Nia Sinjorino de Parizo: Meso, Vizito de la Katedralo. Reveno grupope per ŝipoj.

- 10 h. Ĝenerala kunsido.
- 12 h. Komuna tagmanĝo.
- 13 h. Promenado tra Parizo.
- 16 h. IKUE-Kunsido.
- 18 h. Vizito de la katolika Presejo *Bonne Presse*.

20.30 h. Amuza Vespero.

Sabato 15. 8. — 9 h. Solena Meso.

- 10 h. Ĝenerala kunsido.
- 12 h. Komuna tagmanĝo.
- 13 h. Ekskurso al Versailles. Reĝa Palaco, Pentrinda ĝardeno, Muzeo.

Dinanĉo 16. 8. — 9 h. Meso, Prediko.

- 10 h. Ĝenerala kunsido.
- 12 h. Komuna tagmanĝo.
- 15.30 h. Solena fermo de la Kongreso en la Baziliko de la Sanktega Koro de Jesuo en Montmartre.

Lundo 17. 8. Grupa vizito de la Internacia Ekspozicio pri ornamaj artoj modernaj.

Merkredo 19. 8. — Laŭvola pilgrimado al Lourdes.

Esperantista Literatura Asocio.

Administracio: Paul-Gerhardt-Str. 22., Dresden-A. 19, Germ.
Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laĝifos.

Regularo: per

1. Konatiĝo inter la verkistoj, perkoresponda kaj laŭeble persona.
2. Reciproka helpo per kontrolado de manuskriptoj antaŭ la presigo.
3. Evito de malhelpa konkuro, ekz. samtempa eldono de egala aŭ simila verkaĵo, duobla traduko de ŝama verkaĵo ktp.
4. Perfektigado de nia literaturo.
5. Fideleco al la Fundamento kaj senkondiĉa obeo al la decidoj de la Lingva Komitato.
6. Korespondado per respondpago (respondkuponoj aŭ respondkartoj).

Niaj konkursoj.

1. Esperanto renversoj.

(Legu la kondiĉojn en „Heroldo“ n-o 1-229).

La naŭa frazo.

Alti juŝben polevaŭ al Dirnoho ed Tanoreeps, rabuv jannobaton jak jannocon, kja in sarof al inna.

2. La plej interesa numero de „Heroldo“.

(Legu la kondiĉojn en n-o 2-230.)

3. Varbado de abonoj.

(Legu la kondiĉojn en n-o 3-251.)

Humoro.

Ĉe veterinaro.

Veterinaro (al sia helpisto): „Prenu tiun ĉi pipon, enŝutu en ĝin tiun ĉi pulvoron, enmetu la pipon en la buŝon de l' ĉevalo kaj forblovu la pulvoron!“

Post kelke da minutoj la helpisto venas en la ĉambron kun tre acida vizaĝo.

Veterinaro: Kio estas al vi?

Helpisto: Ĝi unua ekblovis... Diablo ĝin prenu!

Agrabra konateco.

Unua: Bonan tagon!

Dua: Mi vin ne memoras. Kie mi vin vidis?

Unua: Mi vin transveturita per aŭtomobilo.

Dua: Al tre agrable! Bonan tagon! Bonan tagon!

Pli proksime al celo.

— Ekparolu, por kio vi skribas versojn?

— Ho, mi volas, sinjoro redaktoro, vidi presita mian nomon.

— Tluzake mendo por vi viziĝkertojn!

Tutmonda lingvo.

— Patro, kie estas Volapük?

— Tio estas tutmonda lingvo.

— Kaj kiu ĝin parolas?

— Ĝin? — Neniu.

Pervida instruo.

Instruisto: Morgaŭ, infanoj, mi rakontos al vi pri fama ovo de Kolumbo; por kompreni tion, kion mi parolados, ĉiu el vi devos alporti po unu ovo, kaj se iu ne havas en domo kokonon, tiu devos alporti lakton.

La estraro konsistas el du honoraj prezidantoj: s-o prof. Carl. 12, Rue Soufflot, Paris; s-ino M. Hankel, Nicolaistr. 18, Dresden, kaj la prezidantino f-lino Joh. Zschepank, Paul-Gerhardt-Str. 22, Dresden.

Jara kotizo, p-gota komence de l'kalendera jaro, estas por ĉiuj nacioj 2 g. mk., aliĝa pago por novaj membroj same 2 g. mk.. La laste nomitaj sendu do aligante 4 mk. Ni akceptas la monon ankaŭ en allandaj monbiletoj.

Ĉiu esperantisto povas fariĝi membro, kiu per libro, gazeti-artikoloj aŭ poemoj pliriĉigis nian literaturon. Ankaŭ tiu povas esti membro, kiu science, fakte aŭ mone subtenas la asocion.

Raportoj aperas en „Heroldo de Esperanto“, duon-semajna gazeto, H o r r e m apud Köln. Abono al tiu gazeto ne estas deviga, sed tre varme rekomendata.

Januara raporto.

Saluton en la nova jaro!

Jen supre nia regularo. Oni bonvolu speciale atenti la aldonon al punkto 5, kies gravecon ni ne povas sufiĉe akcenti. Ke Esperanto ne difalu en dialektojn, por tio zorgas kaj zorgos la Lingva Komitato, kondiĉe ke ni senescepte nin direktu laŭ ĝiaj decidoj. En ĉiu situacio de la vivo nur kaj sole unueco kondukas al la celo. La L.K. estu kaj restu nia gvidanto, nia „aŭtoritato“. Verkistoj kaj tradukantoj sin demandu en ĉiu okazo, ĉu la formon uzotan akceptis la L.K. En literaturaj verkoj propona apliko de la nova vorto aŭ esprimo estas malrekomendinda, tute ne laŭcela. Tial ripetite: Niaj E.L.A.-anoj uzu nur radikojn oficialigitajn de L.K.

Ni danke ricevis kaj akceptis kelkajn novajn librojn, el kiuj ni hodiaŭ citas du:

„La Tragedio de l' homo“ de Emeriko Maddch, trad. de K. Kalocsay, traktas kvazaŭ kinematografe, en rapida sinsekvo nur laŭsence, la kulturhistorion de la homaro, la eternan lukton inter spirito kaj materio en la homa koro. La verko, laŭleme grave filozofia kaj alpinsca, estas drama poemo riĉa je vivplena beleco. Legado de l' traduko forgesigas, ke ĝi ne estas originalo. Malhavi en ĝi ni volus nur kelkajn neoficialajn vortojn.

„Javaj Legendoj kaj Fabeloj“ de Liem Tiong Hie. Tiu ĉi aminda verko el malproksimega tropiklando enhavas sep fabelojn plenajn de naŭva bonkoreco kaj forta naturkompreno. Tre damage estas, ke la verkinto ne turnis sin al E.L.A., petante kontroli la verkojen antaŭ la presigo. Ĝia ĉarmo multe pli distingus, se la multnombraj erarotoj kaj malĝustajtoj de l' stilo forestus.

Regule al mi sendataj gazetoj, danke ricevataj: Heroldo de Esperanto, je kies duonsemajna apero ni kore gratulas; Literatura Mondo, Kataluna Esperantisto, kiuj ambaŭ kaŭzas al ni ĉiam plezurajn horojn; Litova Stelo, Hungara Esperantisto, Pola Esperantisto raportantaj ĉefe pri la esp. movado en siaj landoj. —

Nian tre ŝatatan membron s-on Edvardo Wiesenfeld ni certigas pri nia sincera kunsento je lia funebro.

Danke ni kvitancas jenajn koizojn: s-o H. Bonnevie (2 g. mk. por 1925), s-o Heino Heilmüller (2 g. mk. por 1924), s-o Teo Jung (5 g. mk. por 1925).

Aliĝis: s-o Prof. Leopold Kronenberg, Bydgoszcz, Polujo.

Sendante registritajn (rekomenditajn) poŝtsendaĵojn, niaj estimataj membroj ne forgesu, citi la nomon J. Zschepank sur la adreso, ĉar alie la poŝto ne elmanĝas la sendaĵojn.

Johanna Zschepank.

Zamenhofa Monumento.

Grava tago.

La 18-an de januaro, ĉiuj anoj de Varsovia Monumenta Komitato kune kun la plej proksimaj parencoj de nia kara Majstro kunvenis are ĉe la tombojo, por saluti la ĵus alvenintan el Skotlando pretan Zamenhofan Monumenton. La Monumento feliĉe trapasis la maron, de Danzigo al Varsovio bone elportis la fervojon kaj liberigita de la limdepago, dank' al la subteno de Pola Registaro, ankaŭ de parto de la transporta tarifo. Dank' al la penoj de nia s-ano Aleksander Róžanykwiat, posedanto de la konata Transport- kaj Ekspeddomo, kiu oferis sian laboron tute senprofite, la Monumento estis sendifekie transportita tuj post alveno al la tombojo, tie starigita laŭ la plano de ĝia aŭtoro skulptisto Lubelski. La 18-an de januaro la varsovia samideano kun la Monumenta Komitato speciale alvenis por kune solene festi tiun gravan por ni momenton. La Monumento plaĉis al ĉiuj; kvankam ĝi estas simpla, modesta, ĝi tamen faras tre estetikajn impresojn; ĝia modestecko similas bone al la modestecko de nia geniulo Zamenhof. Ĉiuj estis kortuŝitaj kaj sendis salutleterojn al la Internacia Monumenta Komitato, al UEA ktp.

Ni atendas la oficialan solenan malkovron de l' Monumento. Tiu ĉi momento devas baldaŭ veni kaj allogi la alvenon de multaj samideanoj al la majstra tombo.

Ad. Oberrotman, membro de l' Varsovia Monumenta Komitato.

La Verda Semajno.

La artikoloj de samideanoj Simeonov kaj Atanasov, publikigitaj en ET 221, enhavas proponon tre konsiderindan, kaj kies realigo povus decidi la plirapidigon kaj venkon de nia movado.

Pri ili mi devas nun averti ion.

1. La „Verda Semajno“ devus esti ĉiujara kaj samtempa en ĉiuj landoj.

2. Eble la monato novembro estas la plej taŭga por Bulgarujo kaj por sudoripaj landoj; tamen oni devas konsideri ke tiam estas tre malvarme en la nordaj landoj kaj tio povus malsukcesigi ion la surstraitan propagadon.

3. Por solvi tiun ĉi kaj similajn demandojn mi proponas, ke ĝin meditu kaj juĝu iu forta esperanta societo, estraro aŭ simila, kiu povus kolekti respondojn de ĉiuj landoj kaj kune kun la konsilioj de niaj trifojte spertiintaj bulgaraj samideanoj trafe decidi.

Tiu centra estraro publikigus siajn decidojn pritraktantaj nur punktojn ĝeneralajn kaj komunajn al ĉiuj nacioj, kaj oni lasus al la naciaj societoj, privatajloj ktp. la liberecon agi laŭ propraj rimedoj, kondiĉoj kaj vidpunktoj. Post la Semajno

neeldirebla malfeliĉeco. Ĉiu el ili havas sian historion plenegan de rezigno, humiligoj kaj mal-espero toleritaj en silentado aŭ elverŝitaj en sentutilaj blasfemoj. Junuloj kaj majjunuloj, en la sama kondiĉo de venkitoj de l' doloro, atendas la horon de la liberiĝo.

Ĉi tiuj ekvidetas lumerojn de espero, rekondukotajn ilin al la gojo de la laboro; tiuj sonĝadas pri reveno al hejmoj de siaj amataj familioj; aliaj, en febra deliro, la brakojn etendas al sonĝvidaĵo de l' forestantaj infanoj...

Sed kiel malmultaj ricevos la forton de l' saneco!

La plimulto estos portata en la grundon de l' tombejoj. Ŝajnas, ke la nepardonema faŝistino gardiradas nevideble tra la longaj koridoroj de l' domego dediĉita al la funebro, al la malĝojo kaj al larmoj de nekonataj kompatuloj...

* * *

... Kiam mi troviĝis ekstere, en la admirinda ĉarmo de l' mateno vestinta per beleco kaj forto la tutan naturon, mi demandis min mem: kial oni ne aranĝas hospitalojn ankaŭ por akcepti la malsanulojn de l' animo, la mortigantojn de l' fremda bonfamo, la epilepsulojn de l' envio, de l' jaluzo kaj de la krimaj ambicioj?

Kial?

El portugala lingvo tradukis I. G. B.

Sentencoj.

Sekreta amo postulas silenton, kaj nobla sento ne estas propra al tiu, kiu laŭtie kaj fanfarone parolas pri ĝi.

Langbein.

⊗

Domo sen viro —

Vivo sen spiro.

oni publikigus la lastajn rezultojn, spertojn, movojn, reformojn de la agadmaniero ktp. Tiel ĉiuj profitus la sperton de ĉiu nacio, kiel ni nun profitos tiun de niaj bulgaraj samcelanoj.

4. Oni povus uzi la manieron cititajn en la jam cititaj artikoloj, kaj krome la sekvantajn kaj aliajn elpensojn de ĉiuj samideanoj.

Afiŝoj en la tramvagonoj. Personoj, kiuj malmulte legas, legas ilin pro la enuo de longa veturado. Nenecese paroli pri legemuloj.

Flugfolietoj disjetataj el aeroplano tre efikus sur sportkampoj, kie oni permesas flugi super ili.

Portado de ŝtetoj. Ne propagandas porti kolosajn ŝtetojn sur la vestaĵo kvazaŭ bildo de mezepoka astrologiisto aŭ flagojn sur la ĉapelo kvazaŭ konkertia kastelo. Tre efikus, se ĉiu portus nur malgrandan sed videblan ŝteton.

Paroladoj per senfadena telefonio. Kiu sendstacio ne permesus unu kvaronon da horo dum sep tagoj ĉiujare?

Krom parolado de fremduloj tre efikus legado de telegramoj, ricevataj de tre malproksima lando (ĉe ni Ĥinujo, Japanujo, Finnlando, Hindujo, Turkujo kaj reciproke).

5. En Hispanujo oni ofte faras la „Fiesta de la flor“ je profito de la Kontraŭtuberkloza Societo. Ĝi konsistas en organizo da multenombraj junulinoj, kiuj portas kusenetojn kun multe da florformaj ŝtopecetoj trapikitaj de pingloj. La virinetoj metas ilin sur la kravatojn, surtutojn, vestaĵojn de viroj kaj virinoj kaj poste petas la prezon, kiun la viktimo jetas en prudente ŝlositan monkeston. Ĉu oni ne povus en kelkaj landoj same agi per Esperanto, precipe se iu serioza kaj konga firmao garantius la honestan uzon de la kolektita mono? Ankaŭ oni povus destini parteton de ĝi por bonfaro.

Ne estas necese aldoni, ke la floroj devus esti anstataŭataj per kvinpintaj pecetoj de verda ŝtofo aŭ eĉ papero kaj ke la vendistinoj devus porti flagojn kaj propagandajn afiŝojn.

Fine: la afero estas longe priiraktinda, kaj tial mi konsilas, ke oni ne forlasu ĝian propagandon inter la esperantistoj kaj ke oni konservu la entuziasmon per artikoloj ktp., kaj eble, per la unuigitaj klopodoj de ĉiuj, fariĝos reala la propono de niaj viglaj bulgaraj samideanoj.

Jesus Paluzie, Barcelona.

*) Festo de la Floro, kompreneble!

Kroniko.

Aŭstralazio.

Dietis, Jogjakarta (insulo Java). Kurson de s-o Blot partoprenas pli ol 50 katolikaj gejunuloj. Fondiĝis IKLIE-rondo kun 9 membroj.

Azio.

Ĥinujo.

Pekin. PEK (Pekina Esp. Kolegio) funkcias jam duan jaron; nun ĝi havas du kursojn (lernojanoj), kiujn gvidas hino Sinsoo Cen kaj rusojn. Celo de PEK estas: prepari por Ĥinujo instruistojn de Esperanto. Krom Esperanto, PEK instruas Ĥinajn literaturon kaj filozofion, novelaron, anglan lingvon, psikologion. PEK havas 50 studentojn kaj 10 instruistojn — La 15. 12. Zamenhof-feston ĉeestis 100 p.; paroladis hinc multaj hinoj, kaj esperante rusoj Sofoklov pri „Elektrifikacio de lernejo“ kaj Serisev pri „Kunfratigo de Oriento kaj Okcidento“ (eldono de ilustr. revuo, en Esp., pri Oriento). — La hinc gazeto „Go-fen Ji-pao“ eldonas hinc senpage ĉiusemajnan 8-paĝan ĵurnalon „Esperanto semajne“, ĉe kiu kunlaboras studentoj de PEK. — PEK akiris de s-o Serisev la manuskripton „Supera gramatiko de Esperanto“ kaj intencas baldaŭ eldoni ĝin; ĝi ankaŭ emas akiri verkon Esperantuja Krestomatio* (legolibro pri Esperantujo kaj Esperantismo) nun verkatan de I. Serisev. — Ejaro de PEK estas sufiĉe ampleksa kaj bona kaj estas vera anguleto de Esperantujo.

Ekzistas oficialaj esp. lecionoj ĉe kursoj (klasoj) 3, 4, 5 de Rusa-hina Ĵura Kolegio, kies instruisto estas s-o G. Sofoklov (ruso), adreso: Pekin, poste restante, plue ĉe Kolegio de Fremdaj Lingvoj, gvid. s-o Serisev, kaj ĉe Pekina Nacia Universitato.

Estas dezirinde, ke samideanoj de la tuta mondo starigu kunligon kun Ĥinaj studentoj per korespondo. Adreso: Pekin, Pekina Esperanto Kolegio, al I. Serisev. I. S., Pekin.

Eŭropo.

Aŭstrio.

Wien. Sanct-Calasanctus-Blätter de jan. raportas pri kristnaska festo de esp-istoj.

Britujo.

London. Dum decembro tri propagandaj paroladoj estis faritaj de s-o J. Bredall en orienta kaj norda Londono pri sia vojaĝado tra sep landoj de centra Eŭropo kaj la viena kongreso. La parolado estis helpata de multaj lumbildoj.

La 23. 1. s-o Bredall parolis en la Londona Esperanta Klubo, la lumbildoj reprezentis vidaĵojn de Dresden, Praha, la mirindaj stalakitaj kavoj en Moravujo, Vieno, Venecio, Milano, la lagoj Italaj, kaj okcidenta Svisujo. S-o B. kaptis la okazon por publikke danki la afablan samideanajn kiuj helpis al li kaj al lia kunvojaĝanto, pastro Dawrey, en la urboj.

Estonio.

Tartu (Dorpat). Dorpater Nachrichten 16. 1. enhavas radukon el ET (nun „Heroldo“).

Germanujo.

Berlin. Deutscher Bankbeamten-Verein (Germana Bankoficista Asocio) enprenis Esperanton en la programon de siaj bankakaj kaj naciekonomiaj prelegoj. La instruado

komenciĝos la 4. 2. 1925, gvid. s-o Karl Fischer, Berlin-Wilmersdorf, Gintzelstr. 31. UEA-delegitoj travidu siajn membrlistojn kaj sendu al li adresojn de esp. bankfakanoj. (Vidu ankaŭ ET 222.)

Essen. Post prop. parolado de s-o poŝtinspekt. Mollenhauer en la ĉefpoŝtoficejo li komencis kurson kun 33 poŝt- kaj telegraf-oficistoj. Poŝta grupo fondota. Adreso: Virgiliast. 3.

Köln. Stadt-Anzeiger de 10. kaj 26. 1. enhavis artikolojn pri Esp.

Hungarujo

Békéscsaba. Rondeto de 9 s-anoj vigne laboras. Grupo fondota.

Gyöngyös. Kursoj en privata lernejo de s-o Hugay; pli ol 100 partoprenantoj. Krome apotekisto Schwartz instruas 30 p. Grupo fondota kun 24 m.

Kiskunhalas. Rondeto de 7 membroj. Grupo fondota.

Hispanujo.

Jerez. Revista del Ateneo 13. 1. enhavas recenzon pri „Lit. Mondo“.

Italujo.

Venezia. Il Gazzettino Illustrato 18. 1. kun bildo de Esp. Grupo Udine.

Nederlando.

Amsterdam. ITF. informoj enhavas esp. rubrikon.

Rusujo.

Leningrad. En Leningrad dum nova vintro funkcias la jenaj esperantistaj organizadoj: Gubernia Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (S. E. U.), SAT-grupo, Societo „Amikaro“ de Esperantistoj-Blinduloj kaj Rondeto de Esperantistoj-Fervojistoj.

Kursoj por komercantoj funkcias en „Domo de Proletaria Kulturo“, en „Centra Klubo ĉe Administra Fako de Gubernia Ekzekutiva Komitato“, en „Gubernia Fako de Sociala Asekuro“, en „Centra Domo de Medicinistoj“, en „Klubo de Oktobra Fervojo“ kaj ĉe blindul-societo „Amikaro“.

Perfektitaj kursoj funkcias ĉe „Amikaro“ kaj Gubernia Komitato S. E. U. La leningradaj SAT-membroj el ĉiuj urbopartoj kunvenas foje monate, kaj en la diversaj rajonoj foje dum semajno.

Ĉiuj kursgvidantoj kaj sekretarioj en la diversaj esp. organizacioj kaj en la registaraj kluboj kaj oficejoj estas salajrataj.

La centro de la leningrada porsperanta movado estas Gubernia Komitato de Sov. Esp. Unuiĝo, Plehanovstr. 2. H. Frank, sekr. de Gubkom SEU.

Tambov. Gubernia fako de popolklerigado enkondukis Esperanton en lastaj (4-5-a) klasoj de du lernejoj de dua ŝtupo (mezgrada lernejo). La lecionoj komenciĝis komence de januaro, gvid. Anatolio Volohov.

Loka poŝtoficejo ekinteresiĝis pri Esp. kaj volas malfermi kursojn por siaj oficejoj. Kiel kursestro estas invitota Nik. Medousoff.

Svisujo.

Bern. Schweizerische Post-, Zoll- und Telegraphen-Zeitung 15. 1. publikigas longan favoran artikolon „Esperanto kaj ldo“

Bibliografio.

Gazetoj.

Esperanto, jan. Genève, Bd. du Théâtre 12. — En art. „Ĉu disfalo en dialektojn?“ D-o Privat pruvas, ke la moderna vivo ne plu konas disfalon en dialektojn, sed kontraŭe la unuecon de la lingvoj. — Aldonoj: Ekonomia Kuriero. En formato kaj arango de Internacia Komercio (ne plu aperanta aldono al ET) kaj ankaŭ sub redakto de fakoperta s-o Kreuz, redaktinto de Int. Kom. — La titolo kaj ĝia arango (la vorto „Ekonomia“ per malgrandaj „Kuriero“ per grandaj literoj) ŝajnas al ni ne tute laŭcela. — Scienca Bulteno, of. organo de Int. Scienca As. Esp., sub redakto de s-o Rollet de l'Isle. — Bulteno de Int. Labor-Oficejo. — Kongresa Bulteno.

Esperanto, jan. Ploesti, Piața Unirei 24, Rum. Nova gazeto naillingva por propagando de Esp. inter rumanoj. Esperable ĝi multe plivigligos la esp. movadon en Rumanujo. Ĉu la titolo ne prezentas maloportunaĵojn pro intermiksado kun „Esperanto“ de UEA?

Espero Katolika, jan. Paris 6, Rue du Vaugirard 55. Svenska Esp. Tidningen La Espero, jan. Svenska Esperanto Föreningen, Stockholm 1. „La Espero“ aperas nun sub nova titolo kaj kun plata kovrilo, ĉefe en sveda lingvo.

Svenska Arbetar-Esperantisten, jan. Svenska Arbetar-Förbundet, Göteborg 7.

Hungara Esperantisto, jan. Budapest 4, Váci- u. 8-1-12. Kun statistikoj: Hung. Esp. Institutio havis 355 anojn en 1923, 607 anojn en 1924

Konkordo, nov.-dec. Zagreb, llica 40. Kun propaganda kaj lit. enhavo.

Literatura Mondo, jan. Budapest, Eötvös- u. 5. Komencas publikigi romanon de J. Baghy „Viktimo“

Aŭstria Esperantisto, jan. Korneuburg apud Wien, Hovengasse 12-2-13.

Le Monde Espérantiste, nov.-dec. Paris Rue Sophie-Germain 5.

Katolika Mondo, jan. Zug, Svisl.

Sennaculo, 22. 1. Leipzig-St, Colmstr. 1.

Averto.

Esp. Asocio Selb (Bavarujo) avertas pri du junaj viroj Adam Dunkl kaj Ernst Zinn el Roppenhausen, ornamitaj per verda ŝtelo, sed sciantaj nur kelkajn esp. vortojn. Ili vizitis nian grupon dirante, ke ili intencas fari „mondvojaĝon“. Vojaĝcelo: Weiden, Regensburg, Passau, Wien. Oni fermu siajn poŝojn kontraŭ ili!

Leterketo.

S. H. en D. El la senditaj 3 resp.-kuponoj du de 11. 6. 24 ne plu validas.

D. en K. Via manuskripto tute ne estas deĉifrebila, kvankam ni uzis niajn plej fortajn okulvitojn. Pro tio via supozebla interesa artikolo ne povas aperi.

Korekta noto pri Latvio.

En „Heroldo“ n-o 2-250, s-ano Krassovskij el Ufa, Rusl., en sia artikolo „Tumonda merkato de arĝento“ skribas ke „Latvio intencas emisi 20 000 000 arg. rublojn“. Mi, kiel laŭta civitano, sciigas, ke neniam ni registaro havis similan projekton. Nia monunujo ne estas rublo, sed lato. 1 lato egalvaloras al 1 svisa orfranko = 1 danziga guldeno = 1 pola zlotoi. Jus en Latvio cirkulas arĝentaj unu-lataj moneroj, plej baldaŭ ni havos du-latajn, kaj mendotaj estas per la registaro arg. kvin-lataj moneroj. E. Grot, Riga.

Grandan mongajnon

promesas partopreno en nove fondota, ĝis nun senkonkurencan entrepreno de

Radio

kiu prezentas ankaŭ gravan helpon al la Esperanto-movado.

Seriozaj interesatoj ĉiulanda, disportantaj pri 500—3000 dolaroj, 2000—10000 svisaj frankoj ktp., bonvolu peti informojn sub „Radio“ per la administracio de

„Heroldo de Esperanto“,
Horrem bei Köln, Germanujo.

Gvidlibro tra Salzburg.

Tiu ĉi ilustrita 52-paĝa broŝuro sciigas pri la vidindaĵoj de la famkonata Mozart-urbo kaj pri la naturaj mirindaĵoj de la ĉarma alp-landeto Salzburg kaj enhavas notojn pri la disvastigo de Esperanto en ĝi.

Mendebila ĉe

Ellersiek & Borel, Berlin S. W. 61.

Prezo: 50 fenigoj.

Mi scias, ke la heraldike ornamitan

Internacian Esperantan Ludkartaron

per kiu estas ludeblaj la plei multaj konataj kartludoj kaj kiun oni tutmonde kore akceptis,

ni deziras fabrikigi aparte en ĉiu lando.

La enlande fabrikita senimposta
I. E. L. estas tre malkara.

Ni intencas en ĉiu lando

memstaran eldono-representanton,

al kiu la aŭtoro

ludonos la patenton.

Jam la investigo de malmulta sumo rezultigas belan profiton.

Pli detalan informon donas

IEL kartcentrojo

Budapest

Hungarujo

Poŝto 112, kesto 11.

Anoncetoj.

Anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 10 vortoj egalvaloron de 0.60 sv. fk. — Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, paroladoj, festoj k. s.) estas senpage (unufoja gravaj). Anoncetoj devas alveni 8 tagojn antaŭ aperado.

PETRE, Madrid. Dona Augusta de Petre, antaŭnelonge loĝinta en Ferraz 54, Madrid, aŭ iu ajn, kiu ŝin konas, bonvole skribu al Ĥino Silverflorne, 31 Devonport Rd., Londono, W. 12. Grava! [2]

TUTMONDA JURISTA UNUIĜO. Juristoj sendu por prepara laboro la precizan adreson al advokato D-o Liebeck, Berlin, Spittelmarkt 11, Germanujo. [254?]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

F-lino Apolonio Kamiński, Drohobycz, str. Krzyza 10, Polujo, deziras korespondi per Pl (hl.) k. ĉ. l. [2]

Sendu 200 PM al s-o Halvor Jakob Jakobsen, Grenaa, Danujo; li ŝatus, se ankaŭ ekster-eŭropaj sendaĵoj alvenus, Respondos tuj. Deleĝitino garantias. [2]

S-o Josef Zwirner, komercisto, Wien 7, Schottenfeldgasse 78, Aŭstrio, deziras interŝanĝi Pl bl., PM, PK kun ĉiuj landoj, precipe kun Ĥinujo. [2]

Grupo de 10 ĝejuuloj deziras korespondi per Pl. Ili nepre respondos. Adreso: A. Warkany, Wien 2, Frz. Hochedlingerg. 17. [2]

S-o Schimek Walter, Feldgasse 8, Trautenau, Ĉeĥoslovakio, korespondas kaj interŝanĝas PM, Pl, papermonon kun gesamideanoj de la tuta mondo. Respondas ĉiam. [2]

Esperanto Grupo Horrem deziras interŝanĝi Pl kun ĉiulandanoj. Adreso: Esperanto Grupo, ĉe Heroldo de Esperanto, Horrem bei Köln, Germ.

Mi deziras interŝanĝi fotografiojn kun ĉiulandaĵo ĉiujlandoj kaj respondas ĉerte al ĉiuj samideanoj per foto. S-o Jan Dako, Mickiewiczza 46, Katowice-Zaleze, Polujo. [2]

S-o Ernst Millahn, bankĉefo, Elbing, Wpr., Am Lustgarten 4, Germanujo, deziras korespondon kun la tuta mondo. Havas intereson por ĉio kaj respondos ĉiam. [2]

Laŭ Yvert 1925, Michel 1925 mi interŝanĝas PM kun seriozaj kolektantoj. Ne sendas unue. Bela Spitzer, fabrikanjo, UEA-delegito, Subotica, Jugoslavio. [2]